

N. N. 32,  
Es ist ein Ros entsprungen

1. Es ist ein Ros entsprungen  
aus einer Wurzel zart,  
wie uns die Alten sung'en,  
von Jesse kam die Art  
und hat ein Blümlein bracht  
mitten im kalten Winter,  
wohl zu der halben Nacht.

2. Das Röslein, das ich meine,  
davon Jesaia sagt,  
ist Maria die reine,  
die uns das Blümlein bracht.  
Aus Gottes ewgem Rat  
hat sie ein Kind geboren  
und blieb ein reine Magd.

3. Das Blümelein so kleine,  
das duftet uns so süß,  
mit seinem hellen Scheine  
vertreibt's die Finsternis:  
Wahr' Mensch und wahrer Gott,  
hilft uns aus allem Leide,  
rettet von Sünd und Tod.

N. N. 32,  
Jen ĉiamviva Rozo  
*tradukita de Leland Bryant Ross*

Jen ĉiamviva Rozo  
laŭ vorto de profet'  
El la Jišaja ŝoso  
ekkreskis kun impet'.  
Ĝi venis, hela Flor',  
en frida tempo vintra  
Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,  
la menciiita Flor';  
Maria ĝin responsis  
el patrin-ama kor'.  
Ŝi naskis Rozon por  
klarigi Dian amon  
Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro  
per sia dolĉ-arom'  
Heligas per Digloro  
la vojon de la hom'.  
Ja homo, tamen Di',  
ĝi ŝargojn malpezigas  
Kaj homojn savas ĝi.

N. N. 32,  
Rozbranĉo forĝermadis  
*tradukita de Felix Ney*

Rozbranĉo forĝermadis  
el trunk' de nobelec'.  
Prauloj jam kantadis:  
de Jišaj ĝia spec'.  
Floretion portis ĝi,  
en akra vintro estis,  
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita  
Jesaja de profet':  
Maria netuŝita,  
de kiu la floret'.  
Eterne volis Di':  
naskinta infaneton  
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro  
alvenas bonodor'  
Ĝi brilas en la koro,  
mallumon pelas for.  
Homido, Dia Vort',  
nin el sufero helpas,  
De pek' Savant' kaj mort'.

...

...

...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 32.

Arg-618-1243 (2012-10-18 21:49:44)

Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en la germana evangelia eklezia kantlibro, kanto n-ro 23. Vidu ankaŭ la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Es\\_ist\\_ein\\_Ros\\_entsprungen](http://de.wikipedia.org/wiki/Es_ist_ein_Ros_entsprungen). - La teksto troviĝas ankaŭ en la retejo <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Tie estas audebla ankaŭ la melodie.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros’ Ha ruo).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamv1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub [http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros\\_h.html](http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html). Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbranca1.html>.